

Bulgara ESPERANTISTO





La partoprenintoj en la X Konsultigo de E-Organizaĵoj (vd. paĝon 2)



Fervore lernas Esperanton la klaso de k-dino Hâlmie Mercanova (vd. p. 3)

La mandolina junpionira E-orkestro en Ĉepelare (vd. p. 3)



ENHAVO

Georgi Dimov. La kongresurbo Varna atendas gastojn el la tuta mondo	1
* * * Komunikado de la X Konsultigo de E-Organizaĵoj el eŭropaj socialismaj landoj	2
Morjana Văleva. III Nacia Renkontigo de Lernantoj-Esperantistoj	3
A. Andonov, Iv. Gospodinov k. a. Korespondadoj el la organiza vivo de la E-societoj	3
Dimitro Canev. Propagando de Esperanto pere de la pentroarto	4
Flori Nikolov. Literatura vespero pri S. M. Simeonov	5
Ivan Vazov. Bonan venon, fratoj! (Traduko de S. M. Simeonov)	6
S. M. Simeonov. Esperanto nepre venkos!	6
Ĥristo Radevski. La vorto (Traduko de D. Haĝiev — Tempesto)	7
Emilija Ĝârneva. Matene ĉe la verkisto Pelin Velkov	7
Stefan Darĵonov. Por nia nuna bonfarto	9
Canko Murgin. La unuaj paŝoj de Esperanto en Bulgario	9
Milica Sokolova. 10-jariĝo de la E-klubo en Novosibirsk	12
Olena Kopistjanskaja. Letero	12
Ida Lisiĉnik. Ĉu por aŭ per Esperanto?	13
* * * Propencu la plej konvenajn E-ekvivalentojn!	15
Romano Grinŝpan. Pri la vorto „preso“	15
Pri la neologismo „koordini“	15
Ljudmila Jevsejeva. Komo	15
Ĵuljeta Meteva. Unikaĵo: domo de la humuro kaj la satiro	16
* * * Pri la gabrovanoj oni rakontas, ke Humuraĵoj pri gabrovanoj	16
* * * Nekrologoj. Deziras korespondi.	III

Sur la kovrilpaĝo :

Salutas la gelnantojn-esperantistojn k-do Vlăčko Marinski (vidu paĝon 3)

Redakta Komitato :

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Dimitro DENCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Vaszja PETROVA.
Korektis : Vasja Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

9523152211
9523154112



LA KONGRESURBO VARNA ATENDAS GASTOJN EL LA TUTA MONDO

Ĉu oni hazarde elektis Varna — la perlon de Nigra Maro — kiel ĉefurbon de Esperantujo por la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en 1978? Tute ne! Plena je naturaj belaĵoj kaj rimarkindaj kulturmonumentoj, Varna kun sia ĉirkaŭaĵo delonge allogas turistojn el la tuta mondo. Ĝi havas pli ol 290 sunajn tagojn en la jaro, varman kaj agrablan klimaton kiel la mediteranea kun meza temperaturo de la aero 23,9^o kaj de la akvo dum julio kaj aŭgusto preskaŭ la sama — 24^o.

Laŭ grandeco Varna estas la tria urbo en Bulgario. Grava havenurbo kaj industria centro.

Varna havas antikvan historion. Ĝiaj unuaj loĝantoj estis la tracoj. Ĉirkaŭ la VI jarcento antaŭ nia erao ili estis forpuŝitaj de grekoj el Mileto. Tiam Varna havis la nomon Odesos. Ruiniginta turo de fortikaĵo kaj romiaj termoj de la V jc rememorigas pri tio. Sude de Varna troviĝas maŭzoleo, konstruita honore al la pola reĝo Vladislav III Varnenĉik, kiu en batalo kontraŭ la turkoj en 1444 perdis sian vivon por nia liberigo.

Nun Varna rapide bonkonstruiĝas. Elkreskas novaj kvartaloj kun modernaj konstruaĵoj. En la urbo ekzistas teatro, opero, simfonia orkestro, kvin superaj lernejoj kaj multaj duonsuperaj kaj mezaj lernejoj. Vizitindaj estas la akvario kun interesaj vivantaj marestaĵoj, la arkeologia, mara, etnografia kaj revolucia muzeoj, la arta galerio ka.

Interesa loko, kiu allogas la atenton de la turistoj, estas la antikva enhakita en la rokojn Alaĝa Monaĥejo el la XIII-XIV jc. Ĝi troviĝas 14 km nordoriente de Varna. Je 15 km okcidente de la urbo survoje al la industria urbo Devnja (la iama Marcianopolis) oni renkontiĝas kun stranga kaprico de la naturo — la famekonata „Ŝtona Arbaro“ (Dikilitaŝ).

En Varna kaj ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj interesaj banlokoj, la plej konata el kiuj estas Zlatni Pjasaci (Ora Sablaro, Ora Strando). Ĝi estas ideala kombino de mara kaj monta klimato, kun mineralakvaj fontoj, 4 km longa kaj ĝis 100 m larĝa stranda strio. En Zlatni Pjasaci estas 75 hoteloj kun ĉ. 15 000 litoj, du kampadejoj kun 1800 lokoj por kampado, bangaloj kun ĉ. 2000 litoj, 20 000 sidlokoj en establoj por nutrado, distro kaj ripozo.

Je distanco de 9 km nordoriente de Varna troviĝas la ripozloko „Druĵba“ (Amikeco) kun belega ĉemara parko, mineralakvaj fontoj, baseno kun minerala akvo, hoteloj, originalaj restoracioj. Tie ĉi troviĝas la Internacia Domo de la Sciencistoj „Jolio Kjuri“ (Joliot Curi).

Ambaŭ ripoz- kaj kuraĉlokoj proponas al la gastoj tre bonajn kondiĉojn por tranoktado, ripozo, plaĝo, sportado, akvaj konkuroj, ludoj, amuzado ktp dum ĉiuj sezonoj de la jaro.

Se oni veturas 23 kmn norden de Varna laŭ la asfaltita ŝoseo, kiu

serpentumas preter la pitoreska marbordo, oni atingas la plej novan bulgaran ripozlokon ĉe Nigra Maro — „Albena“. Ĝiaj hoteloj havas originalan arkitekturan stilon. Se oni daŭrigas la veturadon ĉu per aŭto, ĉu per ŝipeto, oni baldaŭ atingas la urbon Balĉik, ŝirmitan nordoriente de promontoro Kaliakra. Okcidente de Balĉik troviĝas palaca komplekso en orienta stilo. Ĉarma parko kun bruantaj kaskadoj, serpentumantaj krutaj vojetoj, torrentoj, basenoj kaj maloftaj bonodoraj floroj allogas turistojn el proksimaj kaj malproksimaj landoj. Nun ĝi estas bazo de la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Ankaŭ sude de Varna troviĝas lokoj, kiuj allogas la turistojn. Jen estas kelkaj: la larĝfolia praarbaro Longoz, en kies sino, ĉe la pitoreska enfluejo de rivero Kamĉija, troviĝas la nova ripozloko Kamĉija. Iom pli sude kuŝas la ripozlokoj Ŝkorpilovci kaj Bjala, kiuj havas vastajn plaĝojn, puran neprofundan maron kun glata marfundo. Pli sude Obzor, Slânĉev Brjag (Suna Bordo), la antikva Nesebâr, Burgas, Sozopol (la iama Apolonia), la sorĉa rivero Ropotamo, Kiten, Primorsko k. a. kun siaj vastaj kaj intimaj oraj strandoj kaj larĝfoliaj praarbaroj proponas bonegajn kondiĉojn por ripozo, subakva fiŝkaptado, akvaj sportoj kaj amuzoj.

En Varna kaj ĝia distrikto ekzistas 14 E-societoj kun ĉ. 500 membroj. La plej malnova kaj la plej vigla estas E-societo „Albatroso“, fondita en 1904 j. Ĝi havas ĉ. 200 membrojn, kiuj preskaŭ ĉiuvespere kolektiĝas en sia propra klubejo en la centro de la urbo. La plej juna estas E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Popola Soveto kun 123 membroj.

Varna kaj Nigra Maro estas allogaj ne nur por turistoj kaj somerumantoj, amantaj la naturon, sed ili allogas ankaŭ poetojn kaj pentristojn kaj inspiras ilin. Ĝi estas prikantita en mirindaj literaturaj kaj pentroartaj verkoj.

Ni esperas, ke ankaŭ Vi, kara kongresano, havos la eblecon gustumi la proverban bulgaran gastamon kaj ke Vi estiĝos nia bona amiko. Malnova itala proverbo diras: „Vidu Napoli kaj poste mortu!“ Ni, la esperantistoj de Varna, diras: „Vidu Varna-n por eterne vivi kun la belaj rememoroj!“ Kaj certe Vi revos pri rea kaj rea vizito.

Koran bonvenon al la ĉarma kaj varma urbo Varna!

Doc. GEORGI DIMOV
viceprezidanto de LKK — Varna

KOMUNIKO DE LA X-a KONSULTIĜO DE ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ EL EŬROPAJ SOCIALISMAJ LANDOJ

En la tagoj de la 10-a ĝis la 13-a de marto 1977 j. en Karl-Marx-Stadt (GDR) okazis la X-a Konsultiĝo de Esperanto-Organizaĵoj el jenaj landoj: Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La Konsultiĝo pridiskutis demandojn kaj problemojn de la daŭra kunlaboro de la reprezentitaj organizaĵoj. La partoprenintoj de la Konsultiĝo substrekis la signifon de la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio, informis pri entreprenataj iniciatoj kaj preparis multflankan kunlaboron lige kun ĉi tiu granda datreveno.

Specialan atenton oni turnis ankaŭ al analizo de la atingoj kaj farendaj taskoj en la porpaca agado de la esperantistoj lige kun la antaŭstaranta monda Asembleo de la Packon-

struantoj en Varsovio (majo 1977).

Oni ankaŭ pridiskutis formojn de praktika kunlaboro en la sferoj de scienco, inkluzive interlingvistikon, kulturo, turismo, reciproka informado, kaj akau kunlaboron kun UEA en ĉi tiuj sferoj.

La Konsultiĝon partoprenis ankaŭ gvidantoj de la junularaj sekcioj de la reprezentitaj organizaĵoj.

Estis formulitaj rekomendoj por praktika kunagado. Oni decidis pri la preparo kaj organizo de la XI-a Konsultiĝo.

La Konsultiĝo esprimis specialan dankvorton al la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kiu amike gastigis la delegaciojn.

Karl-Marx-Stadt, la 13-an de marto 1977



III NACIA RENKONTIĜO DE LE NANTOJ- ESPERANTISTOJ

De la 1^a ĝis la 3^a de aprilo en la Disrikta Junulara Domo de Vraca okazis la III Nacia Renkontiĝo de Lernantoj-Esperantistoj. Partoprenis ĝin ĉ. 300 lernantoj kaj studentoj, ankaŭ gastoj el Jugoslavio kaj Finnlando.

En Esperanto varme salutis la junularon la unua sekretario de DK de Komsomolo Vlačko Marinski.

Je la ĉefa temo de la Renkontiĝo — „La junaj esperantistoj en la batalo por paco“ — parolis Nikola Aleksiev, prezidanto de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

La sekretario de BEA Kunĉo Vălev parolis je la temo „La bulgara lernantaro kaj Esperanto“.

Posttagmeze la E-junularo trarigardis la vidindaĵojn de la urbo. Kun aparta intereso oni aŭskultis prelegon pri la kosmaj flugoj — de Eŭgeno Neĉaj el la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo en Sofio, post kiu sekvis projekciado de filmo pri la kuna kosma flugo „Sojuz-Alopo“.

Vespere estis prezentita riĉa belarta programo de profesiaj artistoj kaj lernantoj el diversaj grupoj. Aparte notinda estas la partopreno de altnivela vira okteto (ĉambra ĥoro), kiu malfermis la programon per la himno „La Espero“, plenumante ankoraŭ kelkajn kantojn, kaj de la konata opera kantistino-esperantistino Maria Angelova.

La tutan programon de la Renkontiĝo bonege kompletigis ekskurso al la fama groto „Ledenika“, kiu lasis neforgeseblan impreson ĉe ĉiuj.

Morjana Văleva

E-kursoj en Kubrat

Sub la gvido de Ĥâlmie Merdanova en Kubrat funkcias la unua E-kurso en la teknikumo. La infanoj bone progresas. En januaro ili sukcese prezentis belartan programon antaŭ la partoprenantoj en la Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE).

Nun ili korespondas kun samaĝuloj el Hungario, Italio, ĈSSR, GDR, Sovetunio kaj preparas sian unuan E-ekskurson eksterlanden — al frata Ĉeĥoslovakio, kie ĉi somere ili partoprenos la turisman E-somaĵnon en Slovaka Paradizo.

En Kubrat bone funkcias ankaŭ elementa kurso ĉe la kulturdomo kaj 2 kursoj por progresintoj — en la hospitalo kaj en la kulturdomo.

A. Antonov

Nova E-Societo

La 1-an de februaro en u. Radnevo, distrikto de Stara Zagora, estis fondita E-societo, kiu ricevis la nomon „Trakia Stelo“. La elektita estraro: prezidanto Kosta Katrašev — regiona prokuroro, sekretario Ivan Gospodinov, respondeculo pri la kursoj Kolju Fitkov kaj membroj d-ro G. Georgiev — rentgenologo kaj Georgi Šivarov — malnova esperantisto.

La societo decidis malfermi E-kurson por komencantoj, varbi kandidatojn por la forestaj kursoj de la Instruista Sekcio de BEA ka.

IV. Gospodinov

Efektiva kunlaboro

E-societo „Radio“ en u. Pazarĝik aktive kunlaboras kun la E-societoj en Karl-Marx-Stadt (GDR), Bjalistok kaj Gdansk (Pollando). Okaze de la Somaĵno de Internacia Amikeco ni aranĝis publikan kunvenon de la amikeco, en kiu kara gasto el Pollando — Vitold Simonoviĉ — prelegis pri Gdansk, montrante multajn kolorajn lumbildojn. La salono estis plenplena, la publiko — ege kontenta.

Kun la sama prelego, same tiel sukcese, nia gasto prelegis ankaŭ en Velingrad, en kunveno organizita de E-societo „Stoju Kalpazanov“ en la domo de la bulgara-soveta amikeco.

En ambaŭ okazoj la aŭskultantoj konatiĝis kun la historio de urbo Gdansk kaj ĝia distrikto, kun ties disvolvo kaj sukcesoj en la socialisma konstruado.

Pelko Arnaudov

Ekskurso al Druĵevo

Grupo de novaj geesperantistoj el la fervojista E-societo „Prospero“ — Sofio ekskursis al la E-kursejo en Druĵevo kun sia kursgvidanto Dimitro Borisov.

Ĝoje ni pasigis la tagon en amika atmosfero meze de bela naturo. Por tio multe kontribuis ankaŭ la dommastrino de la kursejo Cvetana Uzunova, homo tre akurata kaj sociema. Ŝi regalis nin per bongusta aroma monta teo.

Nikolina Mavrikova

Junpionira orkestro

Lastatempe en u. Ĉepelare, Smoljan-distrikto, ĉe E-societo „Diĉo Petrov“ estis fondita junpionira esperantista trupo „Juna Stelo“, kiu jam prezentis kelkajn programojn lige kun diversaj datrevenoj. Gvidanto de la mandolina orkestro estas Nikola Vjagov. Arta ĉefgvidanto de la trupo — Dimitro Marev.

D. S. M.

Ŝumen. La jarkunveno de E-societo „Vekigo“ okazis en la nova klubo, disponigita al la societo fare de UK de Patrolanda Fronto. Karaj gastoj estis k-do Petko Todorov el UK de BKP kaj reprezentantoj de E-societoj en Preslav, Vărbica kaj aŭtomobila uzino „Madara“ — Ŝumen.

La agadraporto de la estraro atentigis pri la sukcesoj dum la kongresa jaro. La membroj kreskis al 91 (78 en 1975). La variaj societaj kunvenoj okazis ĉiutage. Tre fruktodonaj estis niaj monataj ĵurnaloj parolataj, en kiuj partoprenis multe da membroj. Arangitaj estis kelkaj ekspozicioj el materialoj ricevitaĵoj pere de niaj korespondantoj el Japanio, GDR, Nov-Zelando ka. Plukreskis niaj rilatoj kun la ĝemeligitaj kun Ŝumen urboj Herson (USSR), Debrecen (Hungario) kaj Magdeburg (GDR). Tre fruktodonaj estis niaj ligoj kun la neesperantistaj organizaĵoj en la urbo.

Pro la modela agado la jarkunveno unuanime reelektis la ĝisnunan estraron kun prezidanto Cvjatko Todorov.

Stefka Mihajlova

Vărbica. Antaŭ unu jaro en u. Vărbica, distrikto de Ŝumen, estis fondita E-societo „Suno“, kiu komencis viglan agadon. En tiu loĝloko Esperanto havas malnovaĵon radikojn. En 1928 j. ĉi tie komencis studi la Internacian Lingvon grupo de progresmaj junuloj sub la gvido de Krum Kuŭmĝiev. Ili fondis ankaŭ E-societon, sed la polico ĉesigis ĝian agadon.

Komence de 1976 en Vărbica, jam urbo,

venis labori Radenko Iliev — membro de E-societo „Progreso“ en la uzino por ŝarĝaŭtomobiloj „Madara“ en Ŝumen. — Dank' al lia iniciato kaj aktiva agado nur post kelkaj semajnoj en la urbo estis fondita E-societo, ekfunkciis E-kurso por junuloj kaj instruistoj.

Fine de marto ĉ. j. okazis la jarkunveno de „Suno“. Partoprenis ĝin ankaŭ gastoj el Ŝumen kaj Preslav, inter kiuj la prezidanto de la Urba Popola Soveto en Preslav Vasil Vălčev, la prezidanto de E-societo „Ora Epoko“ en Preslav d-ro Georgi Popov, reprezentantino de DE de BEA en Ŝumen kaj sekretariino de E-societo „Ivan Kăndev“ en u. Preslav — Rajna Stančeva ka. Salutojn kaj donacojn al „Suno“ prezentis d-ro Popov kaj Stančeva.

Post la raporto kaj la diskutado oni elektis novan estraron: prezidanto Jivko Ĵendov, sekretario Rosica Jordanova, kasisto Maria Boŝaĝieva, kursoj Radenko Iliev, kultur-amasa agado Penka Radeva.

Post la kunveno okazis renkontiĝo kun la prezidanto de la Urba Popola Soveto St. Staĵkov kaj la prezidanto de UK de Patrolanda Fronto Ismail Topčiev. Oni pridiskutis la demandon pri disvastigo de Esperanto en la urbo. K-do Staĵkov proponis sian helpon pri organizo de E-ferioj kaj renkontiĝoj en la pitoreska ripozloko „Vărbica“, kie estas belega naturo kaj bona materiala bazo por tiu celo. Tie povus funkcii ankaŭ E-kurso por komentantoj, kiuj poste povus daŭrigi sian studadon en Burgas — Meden Rudnik.

R. Stančeva

PROPAGANDO DE ESPERANTO [PERE DE LA PENTROARTO]

E-societo „Homeco“ en u. Popovo aranĝis en januaro ekspozicion de nia fervora samideano Prodan Prodanov el Sofio.

La malfermon ĉeestis multaj urbanoj, inter kiuj la unua sekretario de UK de BKP Ivan Velikov kaj la sekretario pri la ideologia laboro Ilija Nikolov, la prezidanto kaj la sekretario de la Urba Soveto Angel Georgiev kaj Pelagia Pašova, la vicprezidantino de la fako pri arto kaj kulturo ĉe la Urba Soveto Pet'a Gabrovska, la prezidanto de la Agrar-Industria Kombinumo Săbi Trifonov, la direktoro de la gimnazio Cvjatko Penev, la estraranoj de „Homeco“, esperantistoj el Popovo kaj el la najbaraj vilaĝoj, multaj partiaj kaj kulturaj aktivuloj, plenaĝaj kaj junaj geurbanoj. La ekspozicia salonego montriĝis nesufiĉa por la ĉeestantoj.

La ekspozicion inaŭguris Pelagia Pašova, post kiu la parolon havis Prodan Prodanov — la aŭtoro de la ekspozicio. Li koncize kaj klare priskribis la esencon de Esperanto kaj ties kontribuon por la mondpaco kaj internacia kompreniĝo. Li rakontis ankaŭ pri siaj

eksterlandaj veturadoj dank' al Esperanto, pri siaj renkontiĝoj kun fremdlandaj esperantistoj kaj kiamaniere la bulgaraĵ esperantistoj kontribuas por la prestiĝo de nia Popola Respubliko.

Dum pli ol dudek tagoj multaj urbanoj, plenaĝuloj kaj gejunuloj — ĉu kolektive, ĉu individue — vizitis la ekspozicion kaj spegulis siajn impresojn en la porimpresa kaŝero. Rilate Esperanton ĉies opinioj estis tre favoraj. Ĝi ege populariĝis inter la vizitantoj.

Intervjuo de Prodanov kun reprezentanto de la Urba Soveto ankaŭ kontribuis por E-propagando. Ĝi estis aŭdigita per la urba radioreto. Grandaj afiŝoj anoncis, ke la ekspozicio estas aranĝita de esperantistoj.

La distrikta ĵ. „Zname na komunizma“ en Tărgoviște kaj „Septemvrijski Plamăk“ en Popovo aperigis favorajn artikolojn pri ĝi, verkitaĵojn de neesperantistoj.

Taksante la rezulton de la ekspozicio ni kuraĝe povas aserti, ke ĝi tre efikas por la popularigo de Esperanto en diversaj medioj kaj socitavoloj. Krom la estetika ĝuo, kiun ĝi



La 23-an de marto la Literatura E-Rondo en Sofio kune kun E-societo „Maksim Gorki“ aranĝis vesperon dediĉitan al la riĉa literatura verkaro de Simeon M. Simeonov — elstara esperantisto-veterano kaj Esperanto-poeto.



Pri lia vivo kaj krea vojo parolis prof. d-ro Stoĵan Ĝuĝev. Li substrekiis, ke la literatura verkaro de la humanisto Simeonov restos por ĉiam valora kontribuo al la „Sofia Skolo“ — laŭ la trafa esprimo de Gaston Waringhien, kontribuo al la trezorejo de la E-literaturo — bulgara kaj internacia.

Naskiĝinta antaŭ 78 jaroj en urbeto Lukovit en familio de poŝtoficejo, Simeonov 20-jara komencis memstare studi Esperanton laŭ la lernolibro de Atanas D. Atanasov — ADA. Li tiel entuziasmiĝis pro la facileco kaj belsoneco de la lingvo, ke jam post dumonata lernado provis verki versaĵojn en la Internacia Lingvo. La juna poeto fariĝis regula kunlaboranto de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ sub la pseŭdonomo Simananda. Jam en 1923 lia versaĵo „Serĉanto“ forte impresis ĉiujn kiel matura verko. Tiutempe Simeonov tradukis fragmentojn el libroj de Nikolaj Raĵnov, partoprenis aktive la E-movadon en Pleven, kie li estis elektita vicprezidanto de la loka E-grupo, kaj tutan lernojaron instruis la lingvon en la urba knaba gimnazio. Veninta Sofion en 1927 kiel radiotelegrafisto, li persone konatiĝis kun nia eminenta E-veterano ADA, kiu ankaŭ nun, malgraŭ sia 85-jara aĝo, ne ĉesigas sian E-aktivecon. Post 1944 Simeonov publikigis originalan kaj tradukitan poezion ankaŭ en la ilustritaj E-revuoj „Nuntempa Bulgario“ kaj „Ripozoj“. Do li dediĉis sian tutan vivon al la Esperanta poezio.

La originala verkaro de Simeonov estas karakterizata per la interna spirito de la E-movado. Liaj poemoj spegulas la kortremo'n kaj la espero'n de la esperantistoj, ilian sindonan kaj senprofitan laboron por efektivigo de la althumanaĵ ideoj pri internacia amikeco kaj kunlaboro, pri paca kaj feliĉa vivo sur la tero. Kiel reprezentanto de la nova unulingva internacia kulturo, jam ĝermanta en la sino de nia movado, Simeonov kreis siajn versaĵojn „Esperanto nepre venkos“, „Nia Espero“, „Memore al Kalocsay“ kaj multajn aliajn ĉiam sub la influo de la samaj noblaj sentoj kaj emocioj, de la sama entuziasmo, kiu'n ni renkontas ĉe la E-klasikuloj.

Nu malpli grandan kontribuon li havas

liveras, ĝi vekas intereson al Esperanto kaj multaj homoj ekdeziras lerni ĝin.

Ni, la esperantistoj de Popovo, esprimas varman dankon al k-dinoj Pelagia Paŝova kaj Petja Gabrovska, kiuj akurate helpis la realigon de tiu valora iniciato. Apartan kaj plej grandan dankon ni adresas al s-ano Prodanov dezirante al li daŭrigi sian noblan agadon — pere de la pentroarto propagandi Esperanton.

En Popovo nia s-ano Prodanov donacis du pentraĵojn: al la Urba Komitato de BKP kaj al la Urba Estraro de la Bulgara Agrarana Popola Asocio, kiuj nun ornamas la kabineton de la unua sekretario kaj la kancelaron de la Asocio. Ambaŭloke oni akceptis la bildojn kun danko kaj favoraj eldiroj pri Esperanto.

Dimitro Canev

Sekretario de E-societo «Homeco»

Vespero dediĉita al Ivan Ŝivarov

La vesperon de la 11-a de marto E-societo „Kulturo“ en Plovdiv dediĉis al la konata esperantisto kaj pentristo-amatoro Ivan Ŝivarov. Pri lia arto parolis Danĉo Danev. Kelkaj pentraĵoj estis ekspoziciitaj en la klubejo, pli granda parto de la ceteraj estis montritaj per diapozitivaj.

V. Kurteva

Nova lernolibro de esperanto

Aperis nova lernolibro de Esperanto, eldonita de ŝtata eldonejo „Narodna Prosveta“. Aŭtoroj — Jordan Markov, Kunĉo Vălev kaj Ivan Sarafov.

La lernolibro estas destinita por lernejoj, sed bone povas esti uzata ankaŭ de civitanoj. Riĉe ilustrita, 192 paĝoj, prezo 0,59 levoj, eldonkvanto 15 000. Aĉetebla en la librovendejoj de „Peĉatni Proizvedenija“.

ankaŭ kiel poeto-tradukanto. Sendepende de tuta vico da malfacilaĵoj, akompanantaj la dornoplenan vojon de ĉiu konscienca tradukisto, li konvinke kaj majstre interpretas diversajn bulgaraŭn aŭtorojn. Tion li atingas dank' al sia impeta kreopovo kaj vasta imago-kapablo, refoje montrante la brilaŭn ecoŭn de Esperanto kiel pontlingvo kapabla transĉoni la tekstoŭn ne malpli bone ol aŭna lingvo nacia. En Esperanton li tradukis el la bulgaraj poetoj Ĥristo Botev, Petko Slavejkov, Ivan Vazov, Dimĉo Debeljanov, Peju Javorov, Stojan Miĥajlovski, Stamen Panĉev, Ĥristo Smirnenski, Nikola Vapcarov, Valeri Petrov ka. Pro sia pli ol 50-jara fidela servado sur la altaro de la E-muzo kaj ĝenerale pro sia granda kontribuo por la bulgara kaj internacia E-movado Simeon Simeonov meritas niajn plej varmaŭn sentoŭn de alta estimo, rekono kaj danko.

Post la prelego de prof. Ĝuĝev sekvis riĉa programo el la verkaro de Simeonov sub la reĝisoreco de nia E-aktoro kaj kanzonisto Miŝo Zdravev. Programeroŭn plenumis Belka Beleva, Miĥail Ĉobanov, Vera Vâĵarova, Miŝo Zdravev, Morjana Vâleva, Ĵorĵeta Zdraveva, Sofka Atanasova, Sabina Kovaĉeva, Galina Spasova, Flori Nikolov kaj la violonistino Joanna Strateva. Tiu lasta senriproĉe interpretis parton el la koncerto por violono de Felix Mendelssohn-Bertholdy. Senĉesaj aplaŭdoj postsekvis ĉiun programeron.

Flori Nikolov

Poezio kaj beletrio

Ivan Vazov

BONAN VENON, FRATOJ!

— Panjo, panjo, ilin vidu! . . .
— Kion? — Vidu, ili venas. . .
Kun armiloj. . . — Nu, rapidu!
Tuj salutu! Vi vin ĝenas?
Alvenigas ilin dio
por nin helpi, filo mia. —
Kaj la fil' al la soldatoj
donas pirojn, kun fervoro
krias el la tuta koro:
— Bonan venon, fratoj!

Kvazaŭ aglo, generalo
l'eskadronojn siajn gvidas,
kaj plugist' kun manoj kalaj
ilin kun admiro vidas:
ŝajne sonĝo tio estas. . .
Jen simile al tempesto
proksimiĝas la soldatoj.
Ĉapon levas li estime
kaj salutas tutanime:
— Bonan venon, fratoj!

1878 j.

Ŝipka! Ŝipka! Tondro estas.
Kurko pasis la montaron.
La miraklon oni festas!
En trakia vastkamparo
junulinoj el tutkoro
jam ornamas per buntfloroj
la ĉevalojn, la soldatojn. . .
Ties manojn ĝojpremante
ili krias jubilante:
— Bonan venon, fratoj!

Ho, fieras la junuloj!
Kozak' nura persekutas
mil banditojn kaj krimulojn —
skadrojn kaj legiojn tutajn.
La bulgaroj ĝojigitaj
rigardante jam kaptitaj
tiujn ĉi banditsoldatojn —
bonvenigas per ĝojkrioj
la kozakkavaleriojn:
— Bonan venon, fratoj!

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

ESPERANTO NEPRE VENKOS!

Esperon nian realigos ni, amikoj*,
Se ni laboros same kiel la formikoj,
Persiste, sindoneme kaj kun optimismo,
Efekte, por triumfi' de la esperantismo.
Rimedoŭn plej efikajn uzu ni konstante,
Abnegacie, ofereme, esperante,
Neniam forgesante nian idealon.
Tiele nur ni gajnos fine la batalon,
Obstine, diligente, kiel realistoj.
Nur tiel estos bonaj ni esperantistoj,

Eliminante ĉiajn dubojn kaj hezitojn,
Por kuraĝigi vigle niajn novvarbilojn.
Regule propagandu ni la lingvon ĉiun tagon,
Entuziasme levu ni la verdan flagon,
Varbante novajn membrojn por movado nia—
Esperantistoj veraj kun viv' harmonia —
Naskitoj de l'homaro nova, tre valoraj
Kaj veraj homoj, noblaj kaj laborfervoraj:
Ornamo kaj de l'nova vivo la fiero,
Sindonaj pacluktantoj sur la tuta tero.

* Akrostiko

S. M. Simeonov



Hristo Radevski

LA VORTO

Komence ekzistis la faro.
Ĝi kreis el besto la homon.
De ie, de l'tempo sen nomo
ĝi venas ĝis nia erao.

Kaj jen dum la tempo rigora
de peno kaj viv' primitiva,
en la pasintec' malproksima
naskiĝis la homa parolo.

Ĝi kreskis, fortiĝis kaj iĝis
flugiloj de l'revo de ĉiu,
de l'penso aŭdaca, jam kiu
en lukt' kaj laboro forĝiĝis.

Tra l'longa krepusk' de l'jarcentoj
sin portis la vorto-racio,
kaj ĝin en la genttestamentojn
enskribis la homa genio.

Ho, kiu tiran' ne renkontis
la vorton per glav' kaj sakrado,
kaj kiu pigme' ne alfrontis
la lumon de ĝia brilado?

Ĝin kruda cenzuro sufokis,
ĝi ĉiujn suferojn trapasis.
Ĝin oni insultis, primokis,
ŝtipare bruligis, frakasis.

Kaj ĝi — de l'justeco la vorto —
la morton potenca superas:
post morto reprenas vivforton,
en glavo kaj kant' reaperas.

Ĝi movas antaŭen la mensojn
kaj emociegas la korojn;
ĝi igas flugilojn potencaj
kaj pliproksimigas la forojn.

Kaj sentas vi, ke vi viriĝas,
ke batas kuraĝe la koro,
ke venkas la vero, ke iĝas
aktiva afer' la parolo.

El la bulgara: Dimitro HAĜIEV — TEMPESTO

LA VERKISTO PELIN VELKOV 70-JARA

Ekde la dua duono de la 20-aj jaroj de nia jarcento Pelin Velkov, nun konata bulgara verkisto, estis aktiva esperantisto, membro de Laborista Esperanto-Asocio (LEA). Li regule kunlaboris al la E-periodaĵoj „Bulgara Esperantisto“, „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden Rabsekor“, „Mejdunaroden Ezik“ ka. Lia unua libro „La verdaj fratoj“, kiel li mem konfesas, estis dediĉita al la vivo kaj agado de la bulgaraj esperantistoj. En tiu tempo P. Velkov tradukis el Esperanto en bulgaran lingvon la romanon „Solidareco“ de Vladimir Kuzmiĉ (originale verkita en Esperanto).

Ni varme gratulas la jubileulon kaj sincere bondeziras al li sanon, feliĉon kaj pluan fruktodonan laboron!

La redakcio

MATENE ĈE LA VERKISTO PELIN VELKOV

Mi rapidis al la verkisto en mateno malvarma kaj malserena.

— Mi naskiĝis en la printempo. Tio estas bona. Sed homo ne faras la monaton, — ekridetis la verkisto.

Vere, li estas printempa homo — kun milda rideto kaj varma, elkora manpremo, kun modestaj akurataj manieroj kaj sento de humuro.

Velkov komencis per ĵurnalistiko —

lia unua amo. Sen tio — laŭ lia diro — li ne estiĝus verkisto. Malfacila infaneco, kiel ĉe ĉiuj naskitaj en la komenco de nia jarcento, atestanto de la Unua Mondmilito, partopreninto en la bataloj en 1923 j., en la Patruja Milito. . .

— Ĝuste tiu tempo faris min ĵurnalistoj kaj verkisto, aŭ — laŭ la oni diro — „tio, kio mi estas“, — kon-

fesis li. Mi ekpensis, kiel ni povus helpi al la nuntempaj infanoj esti pli feliĉaj, kiel mi povus esti plej utila por ili.

Kiel lernanto en 1924/25 j. li legas en gazeto „Misl“ (Penso) la aperigitajn poeziaĵojn kaj li kaj liaj amikoj demandas sin: „Ĉu ni ne povus verki ion pli bonan?“ Tiel naskiĝas la unua kolektiva verko — „Laboro kaj homoj“. Iom poste aperis ankaŭ lia unua memstara libro „La verdaj fratoj“ — feliĉetonoj kaj rakontoj pri la esperantistoj.

— Tiam mi estis kursgvidanto de Esperanto kaj miaj amikoj koleriĝis al mi. Ili ne komprenis la humuron.

Ankaŭ poste li plej ofte subskribas sin per la Esperanta pseŭdonomo Aleno. Iom post iom ekviciĝas priĵunulaj romanoj, noveloj, kolektoj de rakontoj: „La enigma montopinto“, „Du en la groto“, „La savanta insulo“, „Koala“, „Rakontoj pri la sano“, „La kolera Petko“, „La malfeliĉoj de onklo Konĉo“. . . , multaj el kiuj estas tradukitaj fremdlingven. Entute 24 libroj je nuntempaj temoj aŭ verkitaj laŭ rakontitaj okazaĵoj el la vivo de partizanoj, laŭ aŭditaj legendoj, je temoj pri la sanprotekto — kontraŭ malklereco kaj malinteligenteco. Krome — 50—60 titoloj tradukitaj el la rusa, inter kiuj la famaj „Malvenko“, „Ugrjum-rivero“, „Cuŝima“, „Virino en la maro“, la nomoj de M. Gorkij, A. Fadejev, A. S. Novikov—Priboj ka.

Ni interparolis ne sentante la malvarmon. Sed la vetero ne estis konvena por promenado kaj dum ni trinkis po glaso da teo, mi demandis:

— Ĉu vi havas amikojn-humuristojn?

— Jes. Sed ne estas oportune citi nomojn. En tiu aĝo mi povas forgesi iun, kaj li koleros al mi. Ĉie mi aperigadis materialojn, plej multe en ĵ. „Ĵupel“. Mi ŝatas la ŝercojn kaj ĉion naskitan de la humuro. . .

Pelin¹ estas pseŭdonimo. La pasporta nomo estas d-ro Todor Velkov Pelovski. Kiam li estis lernanto en la naŭa klaso de la gimnazio en Vraca, la instruistino de franca lingvo foje riproĉis lin: „He, vi tie. Ĉu Pelin aŭ Pelinski, hodiaŭ vi ŝvebas ien!“

— Tiel mi ricevis novan nomon, tute ne ŝtelitan de Elin Pelin². Kun li ni estis amikoj, kaj mi havas mirindajn rememorojn. . .

Je la fino de nia konversacio nia temo jam estis la nuntempo, la scienc-teknika revolucio, la naturo kaj la homo.

— Kaj kiel vi sentas vin 70-jara?

— Mi sentus min 17-jara, se oni ne estus konstruantaj tiel krutajn ŝtuparojn, kaj se la genepoj ne tirus min malantaŭen. . .

Li ekrigardis super la kadro de la okulvitroj kaj aldonis:

— Mi ne ŝatas tiun bruadon — la jubileojn! La libroj, kiujn la verkisto donas, estas lia ĉiujara celebros. . .

Ni disiĝis. La verkisto iris al matena renkontiĝo kun amikoj en la Asocio de Bulgaraj Verkistoj sur str. Angel Kânĉev 5.

Emilija Ĝârneva

ĵ. „Oteĉestven Front“, 9981/77

El bulgara: K. V.

¹ *Pelin* — absinto.

² *Elin Pelin* — pseŭdonimo de la granda bulgara verkisto Dimitro Ivanov — majstro de la prozo.

DANKON

Sincere mi dankas al ĉiuj pro la varmaj bondeziroj lige kun mia 70-jariĝo.

ALBINAS VEBELIUNAS
Lietuva, USSR

Grava por medicinistoj

Abonu profesion E-eldonaĵon «Medicinistaj Informoj». Aperas en Ĉeĥoslovakio kvarfoje en la jaro. La jarabono 2,50 lv. pagebla al: Jordan Caljovski, str. Opâlcenska 15, 1303 Sofio, Bulgario.

Je la sama prezo oni povas ricevi la aperintajn numerojn de la pasinta jaro.



POR NIA NUNA BONFARTO

Multaj bravuloj de nia popolo pereis en la kontraŭfaŝisma batalo. Unu el ili estas Nikola Slavov Getov.

Li naskiĝis je la 28 de junio 1915 kaj pereis je la 28 de junio 1943.

Nikola Getov devenas el mezriĉa vilaĝana familio. Li spertis rigoran vivon jam en infana kaj junula aĝo. La familianoj — plenaĝaj kaj eĉ la infanoj — devis perlabori la panpecon per abunda ŝvito.

Paralele kun la vizitado de lernejo la malgranda Niĉjo dum „la libera tempo“ devis paŝti la brutojn de sia patro. Kiel „liberan tempon“ la patro opiniis la tempon, kiam Niĉjo ne estis en la lernejo.

En metiista lernejo de Plovdiv la studanto Getov konatiĝis kun la progresemaj ideoj. Li estiĝis aŭtoro de alvokfolio al la tabaklaboristoj, kiu invitis ilin al striko. La ĝendarmoj eksciis kaj kaptis lin. Post kruela turmentado oni starigis la junan komuniston antaŭ tribunalo. La monarkofaŝistaj juĝistoj kondamnis lin je kvinjara mallibereco.

Elirinte el la prizono Getov revenis en sian naskiĝvilaĝon Râjevo Konare. Ĉi tie li tuj komencis viglan klerigan agadon: jen kiel fervora esperan-

tisto kaj ĉiam kiel sindona komunisto, jen kiel abstinulo. Pro lia agado la polico provizore aliloĝigis lin.

En januaro 1943 Nikola Getov fariĝis partizano. Liaj edzino Todora kaj la kvarjara filo tuj estis aliloĝigitaj de la polico.

Nikola Getov kun partizana nomo Savata ekstaris ĉekape de la partizana grupo el Râjevo Konare.

Post kvinmonata partizana vivo pro malsaniĝo li revenis en Râjevo Konare kun la intenco sekrete kuraci sin. Malnobla animo tamen denunciis lin kaj taĉmento da policianoj ĉirkaŭis lian senhoman domon, kie li kaŝis sin.

— Vi estas ĉirkauita, eliru el via kaŝejo! — laŭte ekkriis la plicestro.

Anstataŭ kapitulaci, kiel pensis la policianoj, responde la partizano trafe sendis kuglon.

Komenciĝis malegala pafbatalo, ekrakis aŭtomatpafiloj, bomboj. La tuta vilaĝo estis skuita.

Ricevinte kelkajn mortigajn vundojn Savata celis la lastan kuglon al sia bravega koro.

Heroe pereis la bonanima, kun alt-nobla karaktero Nikola Slavov Getov por nia nuna bonfarto.

Stefan Dargonov

Al la 70-jariĝo de BEA

Canko Murgin

LA UNUAJ PAŜOJ DE ESPERANTO EN BULGARIO

(daŭrigo el n-ro 4)

Dua Esperanto-lernolibro por bulgaroj

Jam en 1893 la juna instruisto Ĥristo Popov pretigis manuskripton de Esperanto-lernolibro por bulgaroj. Li fakte tradukis la ruslingvan lernolibron de Zamenhof, tamen konsideris ankaŭ

ĝian francan eldonon. La teksto estis reviziita de Zamenhof mem. Laŭ peto de Ĥristo Popov la redakcio de „Esperantisto“ donis lokon al lia demando, „ĉu iu ne volus preni sur sin la eldonon de tiu ĉi verko“.

Neniu eldonisto sin anoncis. Tiam Popov mem organizis la aperigon. La printempon de 1894 li dissendis al diversaj gazetoj kaj esperantistaj adresoj presitan varbilon kun alvoko pri antaŭpagataj mendoj je trione reduktita prezo. La redakcio de gazeto „Svjat“ donis detalan informon pri tiu iniciato kaj publike sin engaĝis, ke krom la presejo „Iskra“ de G. S. Semerĝiev en Gorna Orjaĥovica, ankaŭ ĝi mem akceptos abonojn por la lernolibro. En „Svjat“ N. Kovaĉev admonis al la legantoj: „Mi esperas, ke la amikoj de tiu brila ideo — la interamikiĝo de la popoloj, — kiu ornamas la terglobon, ne estos avaraj kaj helpas per abonoj la aperigon de la ĉi supre menciita lernolibro, kiu estas kompilita de bone informita bulgara esperantisto, s-ro Popov“ (aprilo 1894).

Jurnalo „Mir“ favoras Esperanton

En 1896 okazis du gravaj aferoj. La 1-an de majo estis fondita Esperanto-Societo en urbo Veliko Târnovo. La ĉefa merito pri tio apartenas al Ĥristo Popov, kiu loĝis en proksima vilaĝo Dolna Orjaĥovica, kaj al G. Kovaĉev el Veliko Târnovo. Tiu societo ne registris grandajn sukcesojn, sed la fakto mem ke ĝi estis fondita kaj dum certa tempo funkciis, simptomas pri plua paŝo antaŭen post la apero de la dua Esperanto-lernolibro por bulgaroj. Tiu societo tiam estis nura en la tuta lando, ĉar la Esperantista Klubo en Sofio kaj la Bulgara Esperanto-Societo „Espero“ ĉesigis sian funkciadon, post kiam Miloslav Bogdanov forveturis (en marto 1895) al Svislando (Ĝenevo kaj Friburg) kaj Belgio (Antverpeno kaj Bruselo) por daŭrigi siajn studojn de juro. Iom poste ankaŭ la alia gvida esperantisto N. Kovaĉev forlasis Sofion translokiĝante en Pleven, Ruse k. a.

Alia grava atingajo en la sama jaro estas la artikolo de N. Kovaĉev en ĵ. „Mir“ (Paco). Ĝi estas recenzo pri la lernolibro de Ĥr. Popov. La recenzado tamen estas nur motivo. La verko eli-

ras el la limoj de ordinara recenzo kaj transformiĝas en bone argumentitan propagandan artikolon kun multaj konkretaj informoj pri la evoluo de Esperanto en Bulgario kaj en eksterlando. Tie ni legas: „Unu parto de nialanda gazetaro, sen trastudi la sistemon de la lingvo Esperanto, ĝin kromnomis „fantazia“. Kiel ajn estu, tiu lingvo tamen daŭre disvastiĝas preskaŭ tra la tuta klera mondo.“ Kaj plue: „Nun la Esperanto-literaturo fieras pri verkoj de aŭtoroj nuntempaj kaj klasikaj. Antaŭ nelonge mi legis la „Hamleton“ de Ŝekspiro, verse tradukitan en Esperanton“. La amplekso de la artikolo ankaŭ estas okulfrapa. Ĝi okupas pli ol unu kolumpon de la ĵurnalo („Mir“, n-ro 268/1896).

Dekjara jubileo de Esperanto en Bulgario

Lige kun la 10-jara jubileo de Esperanto (1887—1897) Ĥristo Popov verkis propagandan artikolon, kiu aperis en n-ro 5—6 de la aŭtoritata literaturkritika revuo „Misl“ (Penso).

La samen jaron en Rusio aperis kelpaĝa artikolo de N. Borovko pri la historio de la internacia E-movado. La bulgara E-movado okupas indan lokon inter la pioniraj landoj. La aŭtoro konkrete mencias la kontribuon de Miloslav Bogdanov pri E-eldonaĵoj, organizado ka.

Simptomoj pri transiro al nova kvalito

Jam ekde la komenco (somere 1887) Esperanto trovis en Bulgario minimume du atentindajn personojn: Miloslav Bogdanov — tuja apoganto, kaj Nikola Kovaĉev — simpatianto. En la sekva dekduo de jaroj (ĝis la somero de 1899) en la Zamenhof-adresaroj estis enskribitaj ĉirkaŭ 30 personoj, kiuj aktivis per Esperanto internacie (korespondado, ricevado de libroj, gazetoj ka.). Tre grava trajto de la E-movado en nia lando estas tiu, ke ĝi vivis seninterrompe. Dum tiu periodo la bulgaraj



esperantistoj akumulis utilajn spertojn kaj en la lingvoposedo kaj en la organizkapablo. Tio sekurigis *eksplozan*

kreskon de la nombro de esperantistoj internacie agantaj. Ni analizu la tabelon:

jaro aŭ periodo de aliĝo	nombro de aliĝintoj	nomoj de aliĝintoj	loĝloko
1887	1	Miloslav St. Bogdanov — ĵurnalisto	v. Groznatovci
1889	2	Ĥristo Popov — instruisto	v. Dolna Orjaĥovica
		Georgi Pavlov Oreŝkov — telegrafisto	Koprivŝtica
1891	12	Ivan Bulatov — pastro	Sviŝtov
		Todor Daĉev — lernanto	"
		Vladimir Popov	"
		Veselina Vangelova	"
		Petro Balsamĝiev	Sofio
		Lambri Donĉov — studento	"
		Vladimir Genĉev — studento	"
		T. J. Bakov	Plovdiv
		Andreja M. Ĝelepov	"
		Stojan Z. Kableŝkov	Koprivŝtica
		Stojan Nejkov — instruisto	Varna
		J. Ivanov	Silistra
1892	11	Ivan Paunov — instruisto	v. Dolna Orjaĥovica
		G. Stojanov — instruisto	" "
		Jordan Agov	" "
		Bosev	" "
		Ivan Ĥristov — instruisto	Gorna Orjaĥovica
		Aleksandro Nikolov — instruisto	" "
		Teodosi Popov — instruisto	" "
		D. Ivanov — libristo	" "
		S. K. Abraŝev	Sliven
		V. P. Goĉev — studento	Kotel
		P. S. Majmarov — instruisto	v. Pisarevo, distrikto de Veliko Târnovo
1893	2	Nikola Dimitrov Kovaĉev — ĵurnalisto	Sofio
		Georgi Kovaĉev — gimnaziano	Veliko Târnovo
1896	1	Todor Obreŝkov — instruisto	G. Orjaĥovica
1898	1	Velko Peev Uzunski — instruisto	v. Mali Ĉardak, distrikto de Plovdiv
1887—1898	30	membroj	
1899	36	"	
1900	103	"	
1901	117	"	

Evidente la klopodoj de la bulgaraj E-pioniroj ne perdiĝis vane. La atenditaj kaj ege sopirataj sukcesoj ekalvenis en abundo, ĉar nur dum la dua duono de la jaro 1899 per Esperanto ekaktivis 36 bulgaroj, t. e. pli ol tiuj varbitaj dum la 12-jara periodo (1887—1899 inkluzive la someron). Lavange kreskas la bulgara esperantistaro en 1900 (per 103 aliĝintoj) kaj en 1901 (per 117 aliĝintoj). Sendube tio estas atendinda simptomo pri komenciĝo de nova periodo en la historio de nia movado. La motoro de tiu transformiĝo denove estas tiuj sama personoj, kiuj

iniciatis kaj kontribuis dum la komenca periodo: Miloslav Bogdanov (li doktoj riĝis pri juro en Bruselo en 1898 karevenis Sofion), Nikola Kovaĉev (li ĉesis ofici en provincaj urboj kaj en 1898 revenis Sofion), Ĥristo Popov (kiu multe aktivis en la gazetaro en 1899—1901), Georgi Oreŝkov (kiu en 1899—1903 estis efektiva centra organizanto de la movado dum la nova periodo). Konsiderinde kontribuis ankaŭ Krâstjo Ivanov Mirski el Varna (la plej malnova amiko de la ideo pri planlingvo en Bulgario).



TRA LA E★ MONDO

10-JARIĜO DE LA E-KLUBO EN NOVOSIBIRSK

La 26—27-an de marto la Novosibirska E-Klubo celebris sian 10-jariĝon, kiu koincidas kun la 20-jariĝo de la E-movado en la urbo.

La jubilean kunvenon ĉestis gastoj el diversaj urboj. La prezidanto U. A. Sibircev raportis pri la agado de la klubo. Sekvis salutoj de diversaj kluboj kaj amikoj el Hungario kaj Anglio. Aktivuloj de la klubo estis premiitaj per honorfolioj de la Urba Plenumkomitato kaj de la klubo estraro. La kunveno finiĝis per amuzprogramo kaj komuna vespermanĝo.

La sekvan tagon la gastoj trarigardis la akademiurbeton kaj vizitis spektaklon.

Milica Sokolova

Letero el USSR

Kara Jordan!

Dankante vin el tuta koro pro via rememoro pri ni kaj pro la belaj fotoj, kiujn vi sendas, mi ĝoje revenas al tiuj helaj tagoj, kiujn nia esperantista grupo el kelkaj sovetaj respublikoj travivis en Bulgario. Via patrolando restis en mia koro kiel pitoreska suna lando, kie ĉiu ŝtoneto rakontas pri ĝia heroo kaj tragika pasinteco, kie loĝas popolo laborema, muzikema, belaspekta, simila al mia popolo. Ĉie, kien ni veturis, renkontis nin novaj gastamaj amikoj, kiuj, ne ŝparante tempon, rakontis al ni ĉion interesan, kion ili mem konis pri siaj loĝlokoj.

Dum niaj nelongaj interparoloj en Ruse mi ne sukcesis rakonti al vi, kiajn belegajn lokojn en Bulgario ni vizitis, kiajn simpatiajn homojn ni renkontis kaj kiel mi simple enamigis en via lando. Tial mi provos fari tion nun per mia letero.

Jam nia vojo al Sofio tre impresis nin. Preter la fenestroj de nia vagono alternis pejzaĝoj de alta verda montaro, kaj nekonata al mi via samlandano montris al ni multajn belajn anguletojn, ligitajn kun eventoj de via historio. Poste—Sofio, la centra fervoŝtacio kaj la komfortaj ĉambroj de hotelo „Serdika“. La sekvantan matenon ni jam vivis la viglan vivon de via ĉefubro. Ekde la unua rigardo ĉio plaĉis al mi ĉi tie: la suna tago, la verdaj puraj stratoj, la skulptaĵoj en la ĝardenetoj, la elegantaj knabinoj, la nigrabaraj simpatiaj knaboj. Tri feliĉajn tagojn travivis ni en Sofio, dum kiuj ni vidis muzeojn, monumen-

tojn, parkojn, teatrojn, kinejojn, ekspoziciojn. Grandan impreson faris al mi la beleco de monto Vitoŝa, la kvietaj ripozdometo de la esperantistoj. Kun malĝojo mi adiaŭis Sofion, sed la ne malpli interesa Plovdiv jam atendis nin. Pri tiu urbo mi pli bone kantus, verkus versaĵojn aŭ pentrus bildojn, se mi nur scipovus, ĉar nenia vorto povas priskribi ĝian poezian, antikvan belecon. Ĉie regas vin la penso, ke sur tiu ĉi verda ebenaĵo kun sep mirindaj montetoj jam antaŭ kelkaj jarmiloj naskiĝis, vivis, batalis, amis kaj mortis homoj. La nuntempa Plovdiv plektiĝas kun la antikva. Elegantaj magazenoj kaj la romia stadiono en la mezo de la urbo, la oro e traca tempo en la arkeologia muzeo kaj nia moderna hotelo, la sola moskeo en malnova strateto kaj la fama Aljoŝa* sur verda monteto, la sukplenaĵoj, aĉetitaj sur la bazarplaco, kaj la mirakla kantanta fontano, kiun ni vizitis nokte — ĉion ĉi oni neniam povas forgesi. En Plovdiv gastamaj samideanoj montris al ni poetajn lokojn en la nokta urbo kaj nur post noktomezo ni vizitis la E-klubejon.

Matene ni jam devis forveturi. Nia buso ĝoje ruliĝis laŭ aŭtostrado, proksima montaro brilis per matena beleco en la radioj de la ora suno. Nia vojo kuŝis preter la legenda Ŝipka kaj la majesta Monumento de la Libero. Dumvoje ni eksaltis Gabrovon — la ĉefurbon de la bulgara humuro. Finfine — Veliko Târnovo, la celo de nia tiutaga veturado — antikva interesega urbo. Ĉi tie mia fotilo laboris senlace. En Târnovo, kvankam ni restis tie tre mallonge, ankaŭ troviĝis gentila, neŭna jam samideano, kiu promenis kun ni kaj pri ĉio rakontis.

La sekvanta punkto de nia programo estis Albena — belega nuntempa ripozejo sur la ora sablaro de la nigramara bordo. Bonege ni fartis tie — sunbruniĝis, naĝis, radis biciklojn, vizitis Varnon, dancis. Nigran Maron ni ankaŭ adiaŭis, tamen nin jam atendis via bela Ruse, kun novaj impresoj. Ankoraŭfoje mi dankas pro via aktiveco, rezulte de kiu ĉiuj ni fartis bonege en Ruse. Ĉu vi memoras la infanetojn en la infanĝardeno, kiuj kantis kaj dancis por ni, nian promenadon per boato sur Danubo, nian viziton en la Instituto de la Rivera Navigado, niajn agrablajn vesperojn, kiam ĉiuj fartis kiel granda familio? Ne estas utopio, ke Esperanto povas kunigi homojn per sia nobla ideo pri amikeco. Oni nur devas bone ellerni la lingvon kaj fordoni peceton de sia koro al ĉiuj homoj — infanoj de la Tero.

Mi finas mian leteron kun granda espero, ke vi nepre vizitos mian landon. Kun plezuro mi servos vin kiel gvidantino tra mia Lvov. Koran saluton al ĉiuj niaj novaj amikoj en Bulgario sendas mi kaj miaj samklubanoj. Ĝis revido!

Olena Kopistjanskaja

* Aljoŝa — karesa nomo de la Monumento de la Liberigintoj, starigita de la dankaj bulgara popolo sur unu el la altaĵoj de Plovdiv honore al la Soveta Armeo.

ĈU POR AŬ PER ESPERANTO?

Stagnado de Esperanto! Kiel ofte ni legas pri tio en niaj revuoj, aŭskultas amasajn deklarojn ne nur de niaj veteranoj, sed ankaŭ de la gvidantoj de nia Movado.

Pasis preskaŭ jarcento post la apero de Esperanto, kaj ĉu ni povas konstati, ke ĝi jam okupis iujn gravajn poziciojn en la socia aŭ ŝtata vivo, en la internaciaj rilatoj? Ĉu ni aŭdas Esperanton en neesperantistaj internaciaj kongresoj, en festivaloj, en internaciaj renkontiĝoj de sindikatagantoj, virinoj, junularo, sportistoj, sciencistoj kaj diversaj fakuloj? Unuvorte, ĉu Esperanto praktike helpas venki la barojn de la multlingveco? Bedaŭrinde, ni ne povas respondi pozitive al tiu demando.

Aliflanke, la longedaŭra ekzisto de Esperanto pravas, ke la kaŭzo de la supretuŝita fenomeno troviĝas ne en la lingvo mem, kiu montriĝis kiel efektive genia instrumento por komunikado en la plej diversaj medioj, same kiel en literaturo, en poezio. Do la kaŭzo de ĝia malrapida progreso troviĝas en la eksteraj cirkonstancoj, en la fakto, ke ĉiuj espero kaj aspiroj de la esperantistoj estas direktitaj nur al oficialigo de Esperanto, al ĝia akcepto eĉ kiel unu el la oficialaj lingvoj de UNO aŭ en internaciaj kongresoj. Sed tio dependas plene de la grandaj ŝtatoj, kies lingvoj jam funkcias kiel oficialaj. Ĉu ili rifuzas siajn privilegiojn, la grandiozajn avantaĝojn, kiujn donas al ili la fakto, ke iliaj lingvoj estas oficiale uzataj, kaj konsentos uzi Esperanton, kiun ili devas ankoraŭ lerni? Ĉu emos akcepti Esperanton la diplomatoj, la armeo de tradukistoj kaj oficistoj, kies bonstato kaj kariero dependas de ilia perfekta posedo de fremdaj lingvoj? Tio certe estas iluzio.

Kie do troviĝas la eliro?

Ĝi estas la sola: Esperanto povas venki nur de malsupre. Se la popoloj

mem konscios ĝian neceson kaj praktike ekuzos ĝin en siaj diversaj internaciaj rilatoj. Kaj tio jam plene dependas de la esperantistoj, de niaj metodoj de propagando kaj laboro. Estas absolute nediskuteble, ke la uzataj ĝis nun malnovaj metodoj de propaganda kaj Esperanta laboro ne pravigis sin.

Kiuj estas tiuj metodoj? Prelegoj pri Esperanto, organizo de rondetoj, lastatempe la tendaroj por praktikado de la lingvo, por plialtigo de la lingva nivelo, unuvorte, ĉio por Esperanto, sed nenia utiligo de la lingvo por praktikaj celoj. Jen kial la rezultoj estas tiel mizeraj. En la E-rondetoj ofte komencas studi centoj, sed restas en la Movado unuopuloj, kaj ankaŭ ili ne scias, kion fari per tiu ĉi lingvo. Ja ne ĉiuj emas korespondi.

En la E-kunvenoj oni kuirigas en la propra saŭco, sed iun praktikan celon aŭ terenon por uzado de la lingvo oni preskaŭ neniam trovas, se ne konsideri la korespondadon.

Sed la esperantistoj ja ne vivas en senaera spaco, izolate de la socia vivo de sia lando. Ĉiu el ili laboras en diversaj sferoj de la politika, ekonomia aŭ kultura vivo kiel sciencisto, ĵurnalistoj, sportistoj, komercistoj, laboristoj k. t. p. Ĉu ni povas diri, ke en tiuj diversaj medioj estas sentata la esperantista influo? Kiel ofte okazas, niaj kolegoj havas nenian ideon pri Esperanto, nenion scias pri ĝi, kaj tiu, kiu ion aŭdis pri la lingvo, ofte diras: „Por kio mi lernu Esperanton? Mi ofte estas en eksterlando, partoprenas internaciajn kongresojn aŭ fakajn renkontiĝojn, sed neniam mi aŭdis, ke iu parolas Esperanton, aŭ ke Esperanto helpas forigi la lingvajn barojn. Do, kion Esperanto donos al mi praktike?“ Mi ne parolas pri tio, ke multaj, eĉ instruitaj homoj, eĉ redakcioj, estas konvinkitaj, ke Esperanto celas anstataŭi

la naciajn lingvojn, kaj tiu supozo klarigas ilian aktivan malamikecon al Esperanto. Inter la esperantistoj troviĝas ne malmulte da elstaraj homoj, sciencistoj, verkistoj, inĝenieroj, politikaj agantoj. Sed ĉu oni iam aŭdas, ke ili utiligas Esperanton en sia medio, en sia profesia laboro? Tiuj homoj kvaŝaŭ estas ĝenataj anonci sin publike kiel esperantistoj. Jen konkreta ekzemplo: en 1976 en Bruselo okazis la Internacia Asembleo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Ĝin partoprenis reprezentantoj de UNO, UNESKO, la Interparlamentara Unio, la Tutmonda Konsilio de la Paco, la Tutmonda Federacio de Demokratia Junularo, la Internaciaj Unioj de Studentoj, virinoj, kristanoj, reprezentantoj de plej diversaj profesioj, religioj ka. krom . . . esperantistoj. La Preparkomitato de la Asembleo en Bruselo deklaris: „La kvalite nova momento en nia Asembleo estas tio, ke ĝi estas malfermita por reprezentantoj de ĉiuj sociaj kaj politikaj grupoj, kiuj deklaras sin por malstreĉiĝo de la internacia tensio kaj por kunlaboro en Eŭropo.“ Kial do en la Asembleo partoprenis eĉ ne unu internacia E-organizaĵo: nek UEA, nek TEJO, nek eĉ MEM? Ĉu ekzistis pli grava kaj samtempe pli alirebla por ni forumo por aktivado de la esperantistoj ol simila asembleo laŭ ĝia programo, laŭ universaleco de la partoprenantoj kaj larĝa ebleco de kunlaboro, finfine tiel proksima al la ideoj de la esperantismo kaj ĝiaj praktikaj celoj? Sed ni preterlasis tiun eblecon, kiel en multaj aliaj okazoj, preterlasis la ŝancon rememorigi pri la laboro de la esperantistoj, pri iliaj idealoj kaj celoj.

Tio, bedaŭrinde, karakterizas la ĝeneralajn principojn de laboro de multaj niaj organizaĵoj, de niaj kongresoj, la metodojn de nia propagando: ĉio nur inter esperantistoj, kaj tro malmulte por la ekstera mondo.

Kompreneble, estus malĝuste ne rimarki la kreskantan tendencon transiri al praktika uzado de Esperanto en

turismo, fervojoj, komerco, batalo por paco ktp. Ni havas iam iujn sukcesojn tiurilate en Bulgario, Jugoslavio, Pollando ka. Kun granda ĝojo mi tralegis en j. „Komsomolskaja Pravda“ de la 3 de aŭgusto 1976 en la artikolo „Por solidareco, paco kaj amikeco“, ke al la tutmonda kampanjo „La junularo senmaskigas la imperiismon“ aliĝis centoj da plej diversaj junulaj organizaĵoj, eĉ ne apartenantaj al la Federacio de Demokratia Junularo, kaj inter ili „eĉ internacia organizaĵo de la esperantistoj, deklaranta principon de nepolitikemo, sed kiu tamen opinias, ke oni povas kunlabori kun la la Federacio por senmaskigi la intrigojn de la imperiismo en la spirita vivo kaj kulturo.“

Interesa estas tiu „eĉ la Internacia organizaĵo de la esperantistoj“. Ja la unuan fojon oni aŭdas pri manifestiĝo de esperantistoj en neesperanta internacia forumo. Bedaŭrinde, tiu salutinda debuto ne estas tre logika: ĉu la kunlaboro kun la Federacio de Demokratia Junularo por senmaskigo de la imperiismo, estu ĝi nur en „la spirita vivo kaj kulturo“, konformiĝas kun „nepolitikemo“? Jen ankoraŭ unu pruvo pri la absurdo de nia fama neŭtraleco, kiu fakte neniam ekzistis, kaj kiu, interalie, estas unu el la sufiĉe gravaj kialoj de la stagnado de la E-movado, ĉar ĝi detenas la partoprenon de la esperantistoj en la batalo kontraŭ la krimoj de la imperiismo, en la laboro kaj aktivecoj de la tutmonda progresema junularo. Sufiĉas jam nur kanti himnojn al nia „kara Esperanto“. Jam delonge venis la tempo, ke la esperantistoj ludu aktivan rolon en ĉiuj progresema internaciaj organizaĵoj, ke ili kuraĝe aŭdigu siajn voĉojn ne nur por Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto, ke ili helpu la venkon de ĉiuj progresema, humanaj ideoj de nia epoko, ignorante la falsan neŭtralismon.

Ne la ĝeneralaj E-rondetoj devas esti la ĉefa celo de la E-organizaĵoj, sed la instruado de Esperanto al partoprenantoj de olimpiadoj, festivaloj, mon-



daj kongresoj ka.; zorgi en ĉiu lando, ke la alvokoj, similaj al tiu de hungaraj olimpiadaj ĉampionoj pri ellerno de Esperanto, ne ekpendu en la aero, ne restu sen ĉho.

Se ne nur ĉiu E-organizaĵo, sed ankaŭ ĉiu esperantisto en siaj sferoj de laboro kaj aktivecoj helpus la solvodon de iuj praktikaj problemoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj en la internacia solidareco, tiam eĉ sen oficialigo de Esperanto oni ne plu parolus pri stagnado de Esperanto.

Por via lingva perfektigo

PROponu LA PLEJ KONVENAJN ESPERANTAJN EKVIVALENTOJN!

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj la estraro de la Filologa Sekcio de BEA entreprenas gravan laboron: ĝustigi kaj difini Esperantajn ekvivalentojn de tipaj bulgaraj esprimoj kaj vortoj aŭ tiaj, kiuj mankas en la bulgaraj vortaroj. Oni procedos laŭ plej demokrata maniero — utiligi la kolektivan menson kaj sperton de la bulgara esperantistaro. Pro tio ni publikigos sur la paĝoj de „BE“ la bulgaraĵojn, kaj ĉiu rajtos fari proponojn pri ties Esperanta traduko. Post kolekto de proponoj komisiono de spertaj esperantistoj pridiskutos ilin kaj konfirmos la plej konvenajn, kiuj aperos sur la paĝoj de „BE“.

Ĉiu leganto havas rajton proponi tradukojn kaj same demandi pri diversaj vortoj. Sed tion oni devas fari nur post certigo, ke la koncerna vorto mankas en la grandaj bulgaraj vortaroj aŭ oni opinias la tradukon tie nekosta, nekontentiga.

PRI LA VORTO „PRESO“

Mi multfoje renkontis en E-gazetoj, precipe el slavaj landoj, la uzadon de la vorto „preso“ en senco „gazetaro“. Tia uzo estas evidenta miso, konfuzanta la leganton. „Preso“ povas signifi nur la agon presi, aŭ presaĵon. Sed ne ĉiu presaĵo kaj neniu pres-ago povas esti gazeto. Ni ne rajtas aŭtomate preni el naciaj lingvoj la vorton „presi“ en ĝia origina senco, ĉar la radiko „pres“ estas jam okupita de alia signifo.

PRI LA NEOLOGISMO „KOORDINI“

Oni renkontas nemalofte en niaj gazetoj la vorton „koordini“. Tiu vorto ne ekzistas en Esperanto, kaj neniu ĝin bezonas, ĉar esperantistoj havas belan, „leĝe naskitan“ vorton — „kunordigi“.

R. Grinšpan

Do, responde al la ĉefa temo de la Eŭropa E-Konferenco en Zagrebo (12—19 de aŭgusto 1972) mi emus respondi: la ĉefa kialo estas ni mem, la arkaj kaj metodoj de nia laboro — ĉio nur por Esperanto kaj tre malmulte per Esperanto.

Noto de la redakcio. La redakcio petas ankaŭ aliajn esperantistojn esprimi sian koncepton pri la problemoj starigitaj en la grava artikolo de s-anino Lisiĉnik. Ĉiuj artikoloj aperos en la rubriko „Libera tribunio.“

Ĉi-sube ni publikigas la unuan vortojn kaj esprimojn, pri kiuj ni atendas tradukojn ĝis unu monato post la apero de la gazeto.

отчетен доклад
отчитам се (за направени разходи)
отчитам (грешките си)
отчитам се (към организация с членски внос)
отчетен член
комплекс (жилищен, санитарен, туристически, черноморски)
кебапче, кюфте
четирилистна детелина
район (като част от града)
оспорвана борба
спортна дисциплина
санитарен възел
закрит басейн
разузнавач (военен)
схващам се

Verdaj steletoj

Ljudmila Jevsejeva

KOMO

Farante ordon en la teko,
mi trovis komon.

El kajer'
ĝi malaperis de post vorto
en plej sekreta manier'.
Tuj foliumos mi la paĝojn
por trovi,

kie mankas kom',
kaj revenigos la fuĝinton
al ĝia intervorta dom'.
Ne estas granda komo, vere,
ne pli

ol timiana sem',
sed gravas ĝia lok' en frazo
nur dank' al sci' kaj laborem'.

La Domo de la Humuro kaj la Satiro en Gabrovo estas konstruita surbaze de la tradicia Festivalo de la Humuro kaj la Satiro en Gabrovo, Bulgario, kiu okazas ĉiun duan malparan jaron en majo, kaj surbaze de la fame konata popola humuro en la sama regiono.

Multnombraj humoristoj kaj satiristoj el la tuta mondo kaj diversaj kulturaj institutoj montras grandan intereson al tiu domo. Sub la devizo „La mondo ĝisvivis, ĉar ĝi ridis“ estas kolektataj, esplorataj, montrataj en ekspozicioj kaj propagandataj la plej valoraj verkoj el la humuro de la popoloj, kreita en la historio de la diversaj ĝenroj de la arto: karikaturo, pentroarto, skulptarto, literaturo, teatro, kino, folkloro, etnografio, muziko, cirko, estrado ktp. En kons'ruado estas speciala biblioteko, en kiu kolektiĝos humuraj eldonaĵoj el la tuta mondo. En la komplekso estas ekspoziciaj salonoj, rezervejoj, varietea teatro, kinejo, salono por konferencoj kaj

renkontiĝoj, subĉiela amuzparko kaj diversaj aliaj amuzejoj. En la domon iam alvenis pli ol 18 000 donacoj — humuraj libroj, ilustritaj katalogoj kun desegnaĵoj, bildoj, karikaturaj ktp.

En la domo ekzistas diversaj fakoj: karikaturo, pentroarto, skulptarto, literaturo, etnografio kaj folkloro, kino, teatro, muziko, foto, bibliografio.

Dum la tradicia festivalo oni aranĝas karnavala'n festojn. En ili partoprenas en- kaj eksterlandaj grupoj. Estas ankaŭ aliaj diversaj aranĝoj: internacia revuo de la kome'ia kaj animacia filmo, nacia ekspozicio de la karikaturo, internacia ekspozicio de la karikaturo kaj la malgranda satirplastiko (dum kiu internacia komisiono aluĝas la grandan premion „La Ora Ezopo“), internacia konkurso „Foto-Rido“ kaj revuo de la bulgara komedia filmo.

Julietta Meteova

Noto de la redakcio. Ni alvokas al la tutmonda esperantistaro sendi al la Domo de la Humuro kaj la Satiro en Gabrovo konvenajn materialojn kaj speciale E-humuraĵojn.

PRI LA GABROVANOJ ONI RAKONTAS, KE...

... nokte ili haltigas la horloĝojn, por ke iliaj dentoradoj ne eluziĝu.

... ili tranĉas la vostojn de la katoj — tiel la pordo post ili pli rapide fermiĝas kaj la ĉambro ne malvarmiĝas.

... surmetas verdaĵn okulojn al la ĉevaloj nutrant: ilin per rabotaĵo el la lignotasoj, kiu'n ili maŝtre produktas — tiel la ĉevaloj pensas, ke tio estas fojno.

... ili rondodancas en ŝtofpantofloj — por aŭdi la muzikon en la najbara urbo Sevlievo.

... nokte ili lumigas la kokinejojn — tiel la kokinoj pensas, ke jam tagiĝis, kaj demetas ovojn.

... luante ĉambron ili ĉiam atentis, ke apud ĝia fenestro estu fosto kun lampo de la strata lumigo.

... ekfumante ili fendas la alumeton je du partojn, por ke ĝi estu dufoje uzebla.

... ĉiuj pli riĉaj gabrovanoj fariĝis membroj de la societo por protekto de la bestoj — tiel ili havis bonan motivon rifuzi al siaj edzinoj, kiam tiuj petis de ili peltmantelon.

... kiam la ventumiloj estis laŭmodaj, la gabrovaninoj ne ventumis per ili por ilin ne eluzi, sed tenis ilin rektaj kaj skuus la kapojn super ili.

KOMUNA RECEPTO

Malsana gabrovano iris kun sia amiko al kuracisto. Kiam la esploro finiĝis, kaj ili eliris, la amiko ne detenis sin kaj demandis:

— Kial vi diris al la kuracisto, ke vi su-

* El la libro „Gabrovanaj ŝercoj“, eld. „Bulgara Pentristo“, 1966.

feras kaj pro palpitacio, kaj pro malsana stomako, sed vi plendas nur pro kapdoloro? — He vi, stulta! Pro malsana stomako suferas la filino kaj pro palpitacio — la edzino.

— Kaj kian signifon tio ĉi havas?

— Ja mi ne estas stultulo doni monon al la kuracisto kaj por la edzino, kaj por la filino aparte. Nun la medikamento'n, kiu'n li preskribis, ni ĉiuj uzos.

ORGANIZADO

Juna geedza gabrovana paro alvenis Romon. Ili demandis la informanton de la hotelo, kiom da tempo estas necesa por trarigardi la urbon. Li klarigis, ke por tio estas necesaj almenaŭ kvar tagoj, kaj estis ege surprizita, kiam post du tagoj la gabrovanoj petis de li la konton.

— Sed kiel vi sukcesis por tiom mallonga tempo?

— Tre simple, — respondis la gabrovano. — Mia edzino rigardis unu parton de la urbo, kaj mi — la alian. Kiam ni revenos Gabrovon, ni rakontos unu al la alia, kion ĉiu vidis.

ZORGEMO

Ĉe kolorigo de la teatro en Gabrovo oni ne kroĉis tabeleton kun surskribo: „Gardu vin kontraŭ la farbo!“, sed: „Gardu la farbon!“

VERA GABROVANIDO

— Donu al mi ĉokoladan hometon, — diris eta loĝanto de Gabrovo al vendistino.

— Kion vi volas: knabeton aŭ knabineton? — demandis ŝi.

— Knabeton! — respondis konsidereme la gabrovanido.

El la bulgara: Kunĉo Vălev



8—31. VII. 1977

*v. Debnevo, distrikto Loveĉ
50 brigadanoj laboros ĉe esplorfosaĵoj
de antikva fortikaĵo*

SOLVO DE LA ENIGMO EN N-RO 1

La nova jaro estu paca kaj feliĉa por ĉiuj homoj kaj popoloj sur la tero kaj sukcesplena por Esperanto.

Korektan solvon sendis: el Bulgario 18 samideanoj, el Sovetunio — 12, el Pollando — 2, el Italio — 1.

NI FUNEBRAS

Pro la tertremo, okazinta la 4-an de marto, en urbo Svištov pereis niaj samideanoj, laborantaj en uzino „Sviloza“:

Ivan Georgiev Ivanov — 37-jara, el v. Icilevo, distrikto de Gabrovo, oficisto.

Hristo Kosev Gârbov — 25-jara, el u. Pavlikeni, elektroingenero kaj

Jordan Ivanov Jordanov — 30-jara, el v. Strahilovo, distrikto de Veliko Târnovo, elektroingenero.

*

La 21-an de marto 1977 forpasis en sia 91-jaraĝo

Todor Gospodinov

la plei maljuna veterano de Esperanto en Stara Zagora kaj ĝia distrikto. Li aktivis pli ol duonjarcenton kiel E-propagandanto kaj kursgvidanto, kiel estrarano de la loka E-societo „Verda Stelo“.

PAŬLO BALKÁNYI

(1894—1977)

La 25-an de februaro forpasis la elstara hungara E-veterano Paŭlo Balkányi.

P. Balkányi estis la unua, kiu aranĝis en Hungario ekspozicion en lernejo (1913) uzante amason da esperantaĵoj (afiŝoj, libroj, gazetoj, ilustritaj poŝtkartoj ktp), akiritaj ekskluzive per lia ampleksa internacia korespondado. En 1918 li sukcesis atingi, ke en kadro de ekspozicio Esperanto ricevis apartan vitroŝrankon kaj en la oficiala katalogo unuafoje aperis teksto esperantlingva.

En la 20-aj jaroj li organizis regulan gazet-servon pri Esperanto. Helpe de tio pluraj centoj da informoj pri Esperanto aperis ĉiutage en la hungaraj gazetoj. Lian ĉiufankan laboron karakterizas liaj pli ol mil E-artikoloj aperintaj en la plej diversaj E-revuoj dise en la tuta mondo.

deziras korespondi

Bulgario

Nova esperantisto-blindulo dez. korespondi per Brajlo. Skribu al ilia kursgvidantino: Janka Nikorvska — str. Bratja Donĉevi 40, 5370 *Drjanovo*.

G. I. ranto 15—18-ara dez. korespondi tutmonde. Skribu al ilia instruistino Elka Milanova Vâlkova — Ekonomia Teknikumo, 5370 *Drajno*.

Ivan Petrov Marinov — bul. Ĥr. Botev 3, 4000 *Plovdiv* (kun ĉi pri ĉi).

Stojanka Iv. Petkova — str. Slivnica 16, 7100 *Bjala*. Rusensko (kun ĉi — gram. diskoj, fotoj de aktoro kaj kantisto, bk ka.).

Esperantisto diversaj — tutmonde pri ĉi. Komuna adres: Esperanto-societo „Verda Eskaŝono“, 7700 *Târgovište*.

Ge. dzo Stojanka Bonva kaj Vasil Dimitrov kaj ilia 13-ara filino Iv. lina Dimitrova — kun ĉi pri ĉi. Adreso: bloko 208, vĥod A, II etaĝo, 5500 *Loveĉ*.

Galina Vasileva — Zavodski blok 23, vĥod 7, I etaĝo, 5500 *Loveĉ* (20-jara fraŭlino — kun ĉi pri ĉi).

Miĉo Georgiev — str. Kableŝkov 11, 5500 *Loveĉ* (28-jara — kun ĉi).

Danail Stoĉev — blok 110, vĥod B, ap. 2, et. I, 5500 *Loveĉ* (28-jara).

Veska Nikolova — 5560 v. *Aleksandrovo*, Loveŝko (22-jara f. ino — kun ĉi).

Verka Paŝeva — blok 207, ap. 14, V et., vĥod G, 5500 *Loveĉ* (30-ara — kun ĉi).

Dora Bonva — str. Samuil 1, 5500 *Loveĉ* (27-jara — kol. pm kaj bk — kun ĉi).

Bogdana Doĉeva — str. Boris Boev 23, IV et., 5500 *Loveĉ*.

Ginka Uzunova — kv. Goznica, 5500 *Loveĉ* (26-jara — kun ĉi).

Asen Jorĉanov — str. Kableŝkov 19, vĥod V, ap. 5, 5500 *Loveĉ* (30-jara — pm).

Veneta Petkova — Zavod „Balkan“, ĉiĥ za leki avtomobili, 5500 *Loveĉ* (28-jara — kol. pm — kun ĉi).


Tanja Marinova — 5568 v. *Lisec*, *Loveŝko* (14-jara kernantino — kun ĉi).

Sovetunio

Bonvolu noti mian novan adreson: Anaĥolio Dobriŝ, 245 110 Ŝostka 7, p. k. 27, Ukrainio. La sama estas adreso de nia E-grupo. La malnova ne plu validas.

TURISTA KOMPLEKSO

„BALKANTURIST“ — SLÂNĈEV BRJAG



- unuaklasaj hoteloj
- restoracioj kun specialaj kuiradoj
- amuzejoj kun distraj programoj
- establoj en nacia stilo kun folkloraj programoj
- diskotekoj
- sporta ilaro — akvoskioj, tenisludejoj, retpilkaj kaj futbalaj ludejoj, ĉevalsporto
- internaciaj muzikfestivaloj:

Ora Orfeo

Internacia Folkloro Festivalo

Dekado de la Simfonia Muziko.

La Turista Komplekso „Balkanturist“ organizas ekskursojn tra la lando kaj eksterlando.

Informojn petu de: TURISTA KOMPLEKSO „BALKANTURIST“, OTDEL „NASTANJAVANE“ — SLÂNĈEV BRJAG, BULGARIO (TEL. 24-88)

Vizitu Slânĉev Brjag — „la sunan bordon“! Ĝuu la ĉarmon de la varma Nigra Maro kaj la gastamon de la bulgara popolo!

